

KATALUNA ANTOLOGIO

3169

KATALUNA

ANTOLOGIO

VERKO REKOMPENCITA
DE LA
"ESPERANTISTA AKADEMIO"

KOMPILITA KAJ PLEJPARTE TRADUKITA
DE
JAUME GRAU CASAS, L. K.

DUA ELDONO



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

EDITORIAL IBÉRICA
BARCELONA - 1931

KATALUNA

ANTOLOGIO

Propraĵo de la kompilinto.
Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

ANTAŬPAROLO

LA KATALUNA LINGVO

HISTORIO

LA unuaj skribaj dokumentoj de la kataluna lingvo estas la "Kanzonoj" de Ot de Moncada, eble el la XI^a jarcento, kaj la "Homilies d'Organyà" kaj kelkaj religiaj poezioj, certe el la XII^a jarcento. Sed jam du aŭ tri jarcentojn antaŭe la kataluna lingvo estis naskiĝinta el la latina. Ĝi do estas la plej antikva el la latinidaj lingvoj, aŭ almenaŭ unu el la plej antikvaj. La "Koncilioj" de Reims (jaro 813) kaj de Tours (jaro 847) rekomendis ke oni prediku en la vulgaraj lingvoj kaj ke oni traduku en ilin la Papajn "homiliojn". Sekvante tiun konsilon, oni komencis prediki katalune anstataŭ latine kaj eĉ baldaŭ la kataluna lingvo komencis anstataŭi la latinan en la skriba uzado.

Dum la XII^a kaj XIII^a jarcentoj, la kataluna lingvo estis riĉigata de la katalunaj trobadoroj, disciploj de la unuaj trobadoroj Provencaj. La forta influo de la Provencaj aŭtoroj sur la komencan literaturon katalunan, kredigis al kelkaj lingvistoj ke la kataluna lingvo devenas ne rekte el la latina, sed el la Provenca. Moderne, oni inklinas kredi ke la kataluna lingvo estas rekta aliigo de la latina (la moderna kataluna lingvo konservas ankoraŭ grandegan kvanton da "latineco") aŭ almenaŭ ke ĝi ne devenas kronologie de la Provenca, sed ke iu malpreciza naskiĝanta lingvo (la "langue d'oc") baldaŭ dividiĝis en du ĉefajn branĉojn: la Provenca kaj la Kataluna. La simileco de la poezio de la famaj Trobadoroj, ĉu Provencaj, ĉu Katalunaj, la komuneco de iliaj trajtoj, povas prui identecon de literaturo, sed ne plenan identecon de lingvo. La lingvo de la unuaj trobadoroj katalunaj estas plena de Provencalismoj, sed jam estas kataluna. Ŝajnas pruvite, ke la lingvo kataluna ne estas "filino" de la Provenca, sed nur

“fratino”: ili ambaŭ estas “filinoj” de la latina. La forta influo de la latina civilizacio estas ankoraŭ nuntempe la ĉefa etnika elemento de la modernaj filoj de Katalunujo (la antikva “Marca Hispanica”) kaj de Provenco (la antikva romana “provinco” en Gaŭlujo).

Post la trobadoroj, floris en kataluna lingvo dum la XIII^a kaj XIV^a jarcentoj, la unuaj poetoj, ne plu nomataj “trobadoroj”, jam plene liberigintaj de la provenca skolo, same en la fundo kiel en la formo. Post la poetika florado, aperis la klasikaj prozistoj, la historiistoj, la filozofoj, la oratoroj, la predikistoj, la religia aŭ mistika literaturo.

Ĝis la fino de la XV^a jarcento daŭris la “ora epoko” de la kataluna lingvo. Ĝi estis oficiale uzata unue de la Barcelonaj Grafoj, poste de la Katalunaj Reĝoj kaj pli poste de la reĝoj nomitaj de kelkaj historiistoj “Aragonaj”, ĉar la katalunaj dinastioj plivastigis sian suverenecon ĉe la teritorioj de la “Kataluna-Aragona Konfederacio”, kiu estis fortega ŝtata potenco kaj en kelkaj epokoj ampleksis, krom Katalunujo, Aragono, Valencio kaj la Balearaj Insuloj, vastajn teritoriojn en Francujo, Italujo kaj Grekujo. La kataluna lingvo ankaŭ havis brilan scenejon en la Kataluna Parlamento, kiu ludis, simile kiel la Angla, rimarkindan rolon. En kataluna lingvo estis redaktata fama mara leĝaro, kiu estis internacie alprenata. La kataluna lingvo estis la unua latinida uzata por filozofiaj verkoj. En kataluna lingvo verkis sian faman “Kronikon” la granda reĝo “Jakobo I, la Konkeranto” kiu konkeris Valencion kaj la Balearajn Insulojn okupatajn de la Araboj, kaj helpis al la kastilaj Reĝoj forpeli siavice la Maŭrojn al la Suda Hispanujo.

En la XVI^a jarcento komenciĝis dekadenco por la kataluna lingvo, reflekto de la dekadenco politika sekve de la kuniĝo de Katalunujo kun la kastila monarkio, kiu baldaŭ atingis plenan superregadon tra la tuta Iberia duoninsulo. Tiu dekadenco akcentiĝis, pro diversaj kaŭzoj, ĝis la fino de la XVIII^a jarcento. Tamen, la kataluna lingvo perdis sian brilecon kiel lingvo literatura, skriba, oficiala, sed ĉiam ĝi estis parolata de la popolo.

En la XIX^a jarcento, la kataluna lingvo renaskiĝis plene al la literatura vivo kaj ree floris en ĉiuj branĉoj. En la nuna jarcento, ĝia vortaro estas plene purigita de fremdaj influoj kaj ĝia gramatiko estas plene re-perfektigita laŭ la modeloj de la bonaj klasikaj aŭtoroj. Pli detale ni parolos pri tia mirinda renaskiĝo, pri tia mirindega perfektigo, kiam ni pritraktos pri la kataluna literaturo.

STRUKTURO

Ĉar la kataluna lingvo okupas proksimume la centron de la teritorio de la latinidaj lingvoj, ĝi en la moderna tempo ricevis influon de la tri grandaj lingvoj hispana, franca kaj itala.

Ĉar la kataluna lingvo vivis kelkajn jarcentojn en dekadenco, t. e. “ne vivante”, en kvietiĝo, en ne-evoluo, ĝi estas konserviginta pli egala al la primitiva formo ol la ceteraj lingvoj novlatinaj. Do, el ĝenerala vidpunkto, la kataluna lingvo estas pli ol ĝiaj fratinoj proksima, simila al la latina lingvo.

Ĉar la kataluna lingvo vekigis al la vivo kaj brile disvolviĝis pli frue ol la ceteraj samdevenaj lingvoj, ĝi posedas, ĝi konservas, malgraŭ la dekadenco, malgraŭ la posta moderna influiteco, multon propran, originalan.

Do en la kataluna lingvo estas tri ĉefaj elementoj: la antikva influo latina (de la patrino), la moderna influo hispana, franca kaj itala (de la fratinoj), la pure kataluna esenco (la propra animo, la individueco).

Alia kvara grava elemento estas en la kataluna lingvo: en ĝi troviĝas kun relativa abundeco grekaj radikoj. (En Empŭries elfosajoj malkovris famajn restaĵojn de greka urbo.)

La fakto ke Katalunujo moderne apartenas al la Hispana Ŝtato, estas la kaŭzo ke la kataluna lingvo alprenis radikojn hispanajn kaj ne povis eviti ian fortan influon. Pro tio kelkaj personoj kredis ke la kataluna lingvo similas la hispanan pli ol iun alian, kaj eĉ “oni” pretendis ke la kataluna lingvo estas “dialekto” de la hispana.

Sed la simileco de la kataluna al la hispana estas simple nur pri vortoj. La sintakso, ĝenerale la tuta gramatiko estas pli simila al tiuj de la lingvo franca. Se estas multaj vortoj katalunaj egalaj al la hispanaj, ankaŭ estas multaj aliaj egalaj al la francaj. Ja la parenceco de la kataluna lingvo venas el la flanko de Provenco, de Francujo, de Eŭropo.

Aliaj kaŭzoj de malsimileco, inter la lingvoj kataluna kaj hispana, estas la forta abundeco de radikoj arabaj en la lasta; la hispana prononcado de la literoj *c* kaj *z* en iu maniero tute ne ekzistanta katalune; la absoluta manko en la hispana lingvo de la katalunaj (cetera ankaŭ francaj, italaj kaj Esperantaj) sonoj “*z*”, “*ĝ*” kaj “*j*”; la multsoneco de la katalunaj vokaloj kompare kun la kvin solaj sonoj de la vokaloj hispanaj; la abundeco de “gorĝaj” sonoj hispanaj; la karakteriza koncizeco de la kataluna lingvo kontraste kun la arabdevena ornamriĉeco de la hispana.

Pro sia pura latineco, la kataluna lingvo estas tre simila ankaŭ

al la itala. Se la kataluna senteble similas la francan koncerne la sintakson, ĝi ankaŭ forte similas la italan koncerne la fonetikon. Ja la simileco kataluna-itala estas pli profunda, sed ni volas diri (kaj iel ni ripetas) ke la similecoj de la kataluna lingvo prezentas tre studindan fenomenon: la hispana influo povis penetri preskaŭ nur la vortaron; la franca—la vortaron kaj prefere la sintakson, sed ne, intense, la fonetikon; la itala lingvo estas similega al la kataluna, precipe en la fonetiko, sed tiu simileco ampleksas samtempe, kun la fonetiko, la vortaron, la sintakson, la spiriton mem de la lingvo. Nur oni devas diri ke la itala prononcado estas multe pli bela kaj dolĉa ol la kataluna, kiu tamen estas tre sonora kaj energia. Eble la antikva kataluna lingvo estis preskaŭ tiel muzika kiel la moderna lingvo itala, sed post la dekadenco ĝi perdis tiun econ.

Pri la latineco kataluna parolas la fakto, ke multaj latinaj vortoj konserviĝis katalune tute laŭlitere kaj ne, kiel en la ceteraj lingvoj novlatinaj, kun malgrandaj diferencoj morfologiaj. Kun la helpo de la latina bazo de Esperanto, ni ofte konstatis ke ne-latinaj samideanoj povis sufiĉe bone kompreni katalunajn tekstojn.

Kaj nun ni devus paroli pri la "kataluna esenco" mem de la kataluna lingvo. Oni ja, jam vidis (kaj oni vidos) ke apud tia kataluna esenco (kiun tie-ĉi ni ne entreprenos klarigi) troviĝas en la kataluna lingvo granda internacieco. Ni nur diros, ke tiun "katalunan esencon", pro iu mistera mirakla mirindaĵo, ni trovas iel simila al la "esperanta esenco" enlovlita en nian karan internacian lingvon de la genio de Zamenhof. Oni certe povis rimarki, per la legitaj linioj, ke ni katalunoj kvazaŭ fieras pri la klasika deveno de nia lingvo. Kaj tamen ni tute nin trovas ĉe ni en Esperanto, kompletigita en sia latina bazo per la riĉigoj germana kaj slava. Eble ne estas alia malgranda popolo kiel la kataluna, tiom kuniginta la amon al la propra lingvo kun la amo al Esperanto. Kvankam unuflanke ni katalunoj povus fieri pri nia Esperanta literaturemo, kiu ebligis la laboraĵojn prezentatajn en tiu-ĉi volumo, aliflanke ni devas sincere diri ke nia merito ne estas tiel granda, kiel unuavide povus ŝajni, ĉar nia lingvo, pro tiu mistera simileco de ĝia esenco kun la esenco de Esperanto, estas eble pli facile tradukebla esperanten ol aliaj, precipe en la poezio. Kataluna esperantista poeto senkonscie aŭ kun bela konscio emas rimigi en Esperanto la katalunajn vortojn: cor-tresor, turmentmoment, cant-diamant, plena-serena, poesia-agonia, k. t. p.

Sed iom ni devos prui kelkajn el niaj antaŭaj asertoj. Por vidigi la malsimilecon de la kataluna lingvo rilate al la hispana, ni prezentos liston de ordinare uzataj vortoj, apartenantaj al diversaj gramatikaj kategorioj. Oni rimarkos ke kelkaj tiaj vortoj, malsimilante la hispanajn, similas la francajn aŭ italajn.

SUBSTANTIVOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
taula	mesa	tablo
finestra	ventana	fenestro
cadira	silla	seĝo
fill	hijo	filo
gos	perro	hundo
avi	abuelo	avo
pluja	lluvia	pluvo
fusta	madera	ligno
argent	plata	argento
barret	sombrero	ĉapelo
por	miedo	timo

ADJEKTIVOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
groc	amarillo	flava
blau	azul	blua
vermell	encarnado	ruĝa
malalt	enfermo	malsana
petit	pequeño	malgranda
dolent	malo	malbona
xerraire	charlatán	babilema
veritable, ver	verdadero	vera

VERBOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
fer	hacer	fari
amagar	esconder	kaŝi
dir	decir	diri
parlar	hablar	paroli
voler	querer	voli
arribar	llegar	alveni
sortir	salir	eliri
tancar	cerrar	fermi
tallar	cortar	tranĉi
començar	empezar	komenci
prendre	tomar	preni
portar	llevar	porti

ADVERBOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
mai	nunca	neniam
gens	nada	neniom
quelcom	algo	iom
prou	bastante	sufiĉe
aviat	temprano	frue
llavors	entonces	tiam
lluny	lejos	for
gairebé	casi	preskaŭ
molt	muy	tre

PRONOMOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
aquest	éste	tiu-ĉi
això	esto	tio-ĉi
res	nada	nenio
tothom	todos, todo el mundo	ĉiuj
ningú	nadie	neniu
cap	ninguno	neniu (nenia)

PREPOZICIOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
amb	con	kun
sota	bajo	sub
vora	cerca de, cabe	apud
cap a, vers	hacia	al
damunt	encima	sur
ultra	además de	krom
fins	hasta	ĝis
àdhuc	hasta	eĉ

KONJUNKCIOJ

<i>Kataluna</i>	<i>Hispana</i>	<i>Esperanta</i>
i	y	kaj
car	puesto que, ya que	ĉar
per tal de	para (a fin de)	por (kun celo)
per tal que	para que (a fin de que)	por ke (kun celo ke)
per tal com	por la razón de que	pro tio ke

Por vidigi la similecon kun la franca lingvo, ni diru ke en la kataluna ekzistas la jenaj oftaj kaj gravaj formoj (tute ne ekzistantaj hispane):

<i>Katalune</i>	<i>France</i>	<i>Esperante</i>
pas (no pas)	pas (ne pas)	ne (dua nea adverbo por plifortigi)
hi	y	adverbo plej ofte signifanta "tie"
(ekzemple: anar-hi)	(ekz.: y aller)	(iri tien)
en, ne, n	en, n	
(ekz.: jo no en tinc pas)	ekz.: je n'en ai pas)	mi ne havas (da ĝi)

Katalune oni uzas la streketon, kiel france kaj portugale, por disigi verbojn de pronomoj aŭ adverboj:

fes-me	faites-moi	faru al mi
doneu-nos	donnez-nous	donu al ni

Sed katalune la uzo de la streketo estas multe pli vasta. Jen unu ekzemplo:

donar-te	te donner	doni al ci
dir-li	lui dire	diri al li
parlar-vos	vous parler	paroli al vi
fer-se	se faire	fari al si

En la kataluna lingvo, kiel en la franca, oni uzas "imperfekton" kaj "futuraon" en okazoj kie la hispana uzas "kondicionalon" kaj "subjunktivon".

Por vidigi la similecon kun la itala lingvo, ni prezentos faman soneton de Dante Alighieri kaj ĝian katalunan tradukon.

Tanto gentile e tanto onesta pare
la donna mia, quand' ella altrui saluta,
ch' ogni lingua divien tremante muta
e gli occhi non ardiscon di guardare.

Ella sen va, sentendosi laudare,
benignamente d' umiltà vestuta;
e par che sia una cosa venuta
di cielo in terra a miracol mostrare.

Mostrasi si piacente a chi la mira
che dà per gli occhi una dolcezza al core
che intender non la sa chi non la prova.

E par che dalla sua faccia si mova
uno spirto soave e pien d'amore,
che va dicendo all' anima: sospira!

DANTE ALIGHIERI

Es tan gentil i tan honesta apar
la meva dona, quan a algú saluda,
que torbada la llengua en resta muda
i els ulls no són gosats a l'esguardar.

Benignament, sentint-se arreu lloar,
ella se'n va, d'humilitat moguda,
i apar com si sigués cosa vinguda
del cel al món, per son poder mostrar.

Tan plaent esdevé per qui la mira,
que dóna als ulls, pel cor, una dolçor
que qui no l'ha provada no en té esment;

com si dels llavis li brollés talment
un esperit suau i ple d'amor,
que va dient a l'ànima: sospira!

Trad. M. MORERA I GALICIA

Por vidigi la relativan similecon kun Esperanto, ni prezentos ne tekston speciale tradukitan de ni, sed katalunan fragmenton de "Ifigenio en Taŭrido" de Goethe, rekte tradukitan el la germana lingvo, same kiel la esperanta. Estas mirinda la fideleco de Zamenhof kaj de la kataluna tradukinto Maragall. Malgraŭ tio ke la traduko estas versa, en kelkaj linioj preskaŭ laŭvorte la esperanta kaj kataluna tradukoj akordiĝas. Post tio-ĉi, la ĝenerala karaktero de la kataluna lingvo, ni kredas, aperos sufiĉe klara.

Al via ombro, pintoj moviĝemaj
de l' densa kaj antikva arbareto,
al la sanktej' kvieta de l' diino
ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras,
simile kiel la unuan fojon:
ne povas mi al vi alkutimiĝi.
Jam multajn jarojn min ĉi-tie kaŝas
plej alta volo, kiun mi obeas;
mi tamen ĉiam sentas min nur fremda,
ĉar ve! transmare estas miaj karaj!
Mi longajn tagojn staras sur la bordo
serĉante per la kor' la Grekan landon;
al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj
respondas la ondegoj de la maro.
Ho ve al tiu, kiu devas vivi
for de l' gepatroj kaj de la gefratoj!
Malĝojo al li rabas la feliĉon;
forvagas flanken ĉiam liaj pensoj
al la gepatra domo, kie suno
al li aperis la unuan fojon,
kaj samdomanoj ĉiam pli kaj pli
en ludo alligiĝis reciproke.

Trad. ZAMENHOF

A la vostra ombra, copes movedices
d'aquest sant bosc tan vell i ple de fulles,
el mateix que en el temple de la dea,
hi entro més frisos avui encara
que el dia que hi vaig dà aquells primers passos:
mon ànima no acaba d'avenir-s'hi.
Ja fa molts anys que em serva aquí reclosa
un alt voler, al qual jo me rendeixo;
prò com ei primer jorn só forastera.

Que em separa la mar dels que jo estimo,
i passo hores i hores a la platja,
vers la terra dels Grecs anhelant sempre;
i contra els meus sospirs només revénen
sordament les onades bramadores.
Ai! malaurat aquell que lluny dels propis
està sol; tot plaer se li amarganta,
i els pensaments tot-hora se l'enduen
vers la casa pairal, allí on va veure
el sol aclarí el cel el primer dia,
i on els jocs lleugers de la infantesa
l'anaven enllaçant amb uns i altres...

Trad. MARAGALL

TERITORIO

La kataluna lingvo nuntempe estas parolata, kun pli-malpli da pureco, en Katalunujo, Valencio kaj Balearaj Insuloj (nordoriento de la Hispana Ŝtato) kaj en Rusiljono (Orientaj Pireneoj, Franca Ŝtato). Ĝi konserviĝis kaj ankoraŭ estas parolata ankaŭ en Alguer (insulo Sardenjo, Italujo) kaj en kelkaj vilaĝoj de Aragono, en najbareco kun la lingva limo hispana.

Primitive, nia lingvo estis parolata nur en la teritorio nomata Katalunujo (al kiu tiam politike apartenis la Rusiljona regiono): de tio venas la nomo "kataluna". Kiam la katalunaj reĝoj forpelis la arabojn el la Balearaj Insuloj kaj Valencio, ili lasis tie katalunojn naskiĝintajn respektive en la norda marbordo kataluna kaj en la ebenaĵoj de Urgell. Pro tio en Valencio kaj Balearaj Insuloj oni parolas katalune. La kataluna lingvo de Alguer estas nur restaĵo rememoriganta pri la tempo de la katalunaj konkeroj en Napolo, Sicilio kaj Sardenjo.

La unueco de la kataluna lingvo, malgraŭ la malfacilaj epokoj travivitaj, estas miriga. La sola diferenco ekzistanta inter la tri grupoj katalunlingvaj (Katalunujo, Valencio, Balearaj Insuloj) konsistas preskaŭ nur el la diverseco de kelkaj sonoj, el la parolmaniero, el la "kantado" de la lingvo. Oni povas diri ke tia diverseco inter la tri grupoj estas nur parola. La skriba lingvo estas tute la sama.

En Katalunujo oni parolas la lingvon ĝenerale kun pli da pureco ol en la du ceteraj regionoj. Tamen, en kelkaj aspektoj, ekzemple en la konjugacio de la verboj, la Valencianoj kaj la Balearoj uzas pli belajn klasikajn formojn ol la Katalunoj mem. La Katalunoj

parolas kun tono sobra kaj energia; la Valencianoj, kun pli da dolĉeco; en la Balearaj Insuloj, oni vere kantas. Malgraŭ la iom diversa fonetiko, ĉiuj katalunlingvanoj plene kaj facile interkompreniĝas.

La aparteno de la Rusiljona regiono, de post 1713, al la Franca Ŝtato, kreis kvaran grupon en la kataluna lingvo. Tie ĝi suferis pli ol aliloke grandan aliĝon, kvankam tiu aliĝo ne rompas la lingvan unuecon. Tio aperas tre komprenebla, se oni atentus ke ne nur la franca kulturo havas pli grandan influon ol la hispana, sed ankaŭ la franca lingvo multe pli ol la hispana similas la katalunan. Certe la franca lingvo, en Rusiljono, influis la katalunan, sed ne povis malaperigi ĝin. La lingvisto Morf trovas en la kataluna lingvo parolata en Rusiljono "lingvan angulon komplete apartiĝantan de la aro da dialektoj sudfrancaj koncerne la fonetikon, morfologion kaj leksikonon, ĝis tia grado ke tiu lingvo troviĝas tie-ĉi kiel io fremda".

Sur la katalunlingva teritorio, kies ĉefurbo estas Barcelona, loĝadas kvin aŭ ses milionoj da personoj, disigitaj politike kaj administracie per limoj ŝtataj, regionaj, provincaj kaj departementaj. Nenie la kataluna lingvo estas nuntempe oficiala; ĝi devas konkuri kun du grandaj lingvoj, la hispana kaj la franca; ĝia uzado kaj instruado estas ĉiufanke malhelpata; en kelkaj rilatoj, la kataluna vivo disvolviĝas en ĝenanta reĝimo de dulingveco. Tamen, super ĉio, la kataluna lingvo vivas, kreskas kaj floras.

DISVOLVIĜO

Komence de sia renaskiĝo, kiam ĝi denove estis vaste uzata ne nur parole sed ankaŭ skribe, la kataluna lingvo disvolviĝis precipe en la literatura kampo. Nun ĝi estas uzata en ĉiuj kampoj.

La kataluna lingvo posedas grandan nombron da propraj literaturaj verkoj (grandegan proporcie kun la nombro de katalunlingvanoj) en verso aŭ en prozo: poemojn, prozaĵojn, romanojn, rakontojn, komediojn, dramojn, tragediojn, k. t. p. Ja tion oni vidos legante ĉi-tiun "Katalunan Antologion". Sed, krom la riĉeco de la originala literaturo kataluna, ekzistas alia miriga riĉeco pri tradukoj. Centoj da verkoj francaj, italaj, germanaj, anglaj, rusaj kaj alilingvaj estas tradukitaj katalune. Ekzemple, ni diros ke ekzistas kompletaj tradukoj en verso de la "Divina Commedia" de Dante Alighieri; de "Ifigenio en Taŭrido" kaj "Hermano kaj Doroteo" de Goethe; de preskaŭ ĉiuj teatraj verkoj de Shakespeare kaj ankaŭ de "Venus kaj Adonis" kaj de la famaj Sekspiraj sonetoj; de la "Enceido" de Virgilio; de la "Odiseo" de Home-

ro, k. t. p. Speciala entrepreno "Fundació Bernat Metge" eldonadas ĉiujn verkojn de la klasikaj aŭtoroj grekaj kaj latinaj, en luksaj kaj belegaj volumoj kun la originala teksto kaj la kataluna traduko.

Aperas multaj ĵurnaloj, inter ili kelkaj grandaj rotativoj, redaktataj nur en kataluna lingvo. Ekzistas ankaŭ kelkaj dulingvaj: katalunaj-hispanaj kaj katalunaj-francaj.

Oni eldonas ankaŭ grandan nombron da katalunaj gazetoj kaj ilustritaj revuoj pri la ĝenerala vivo aŭ specialaj pri arto, literaturo, scienco, teatro, sporto, poezio, muziko, filozofio, pedagogio, politiko, sociologio, ekonomio, religio, bibliografio, biologio, turismo kaj alpinismo, por infanoj, k. t. p.

En la scienca kampo la kataluna lingvo ankaŭ disvolviĝis. Ekzistas multaj kaj gravaj verkoj sciencaj aŭ filozofiaj, ne nur tradukitaj, sed ankaŭ originalaj, eldonitaj precipe de "Institut d'Estudis Catalans".

Generale en ĉiuj rilatoj la kataluna lingvo akiris la plej grandan disvolviĝon eblan en la nunaj cirkonstancoj. Ĝia uzado, eĉ en la ordinara popolo, fariĝas pli kaj pli perfekta. Nuntempe ni povas diri ke ĝia "renaskiĝo" finiĝis: ĝi estas jam maturo por la plej altaj celoj kaj preta aŭdigi sian voĉon en la koncerto de la Eŭropa kulturo.

LA KATALUNA LITERATURO

ORIGINOJ (XI-XII JARCENTOJ)

(De la koncilioj de Reims kaj de Tours ĝis Berenguer de Palol: 813-1150.)

Jam en la jarcentoj IX^a kaj X^a, en la latinlingvaj dokumentoj ekaperis izolaj katalunaj vortoj. En la XI^a j. la katalunaj vortoj miksitaj kun la latinaj estas pli kaj pli oftaj. En la XII^a j. estas dokumentoj jam plene skribitaj katalune.

La du plej antikvaj monumentoj en kataluna lingvo eble estas la "Homilioj de Organya", el la lastaj jaroj de la XII^a j., kaj la "Akto de kapitulaco de la kastelo de Llorenç", farita en 1211. En ambaŭ dokumentoj la kataluna lingvo montriĝas tre precize. Ili estas plene kompreneblaj de la moderna kataluno. Jen du fragmentoj el ili:

"HOMÍLIES D'ORGANYA"

"Quan N. S. Jhesu-Christ anave per les terres de Jherusalem ab los seus disciples, el los dix zo que d'el ere a venir, aixi com l'evangeli o dix, en aquesta guisa: *Ecce ascendimus...* Ara, zo dix N. S. als seus disciples, nos entrarem en la ciutat de Iherusalem e serà acabat tot zo que de mi an escrit los profetes... Yo seré tradid, e pres, e liad, e escopid, e lanceiad, e pugad en crod, e coronad d'espines, et al tercer dia resusetaré..."

"ACTA DE CAPITULACIÓ DEL CASTELL DE LLORENÇ"

"Coneguda cosa sia a totz homes que io en Guerad de Cabrera venc en poder de vos, seinner en Pere, per la gràcia de Deu rei d'Aragó e comte de Barcelona, per pres e per presó, senes mort

e senes affolament de mon cors, que nom sia fet a scient. E liureus lo castel de Lorenz a tota vostra voluntat, en aital guisa que enfre quatre iorns aia treta don Els e mos fils, e ls cavalers e ls homes e totes les coses del castel...”, kaj cetera.

Krom tiuj du specimenoj de primitiva prozo kataluna, konservigis kelkaj religiaj poezioj el la sama epoko kaj kelkaj “Kanzonoj” de *Ot de Moncada*, kiuj eble estas ankoraŭ iom pli antikvaj.

PERIODO DE LA TROBADOROJ (XII-XIII)

(*De Berenguer de Palol ĝis Ramon Lull, 1150-1272*)

La unuaj literaturajoj en kataluna lingvo estis religiaj. Sed baldaŭ aperis poezio kiu prefere kantis la amon, la virinan belecon, la kavalirajn agojn, en lirikaĵoj plej diversformaj. La poezio, komence vivinta apud la Eklezio, disvolvigis poste tra kortegoj, palacoj, kasteloj, placoj kaj stratoj. Dum epokoj de paco, aŭ de interpaco inter ĉiuspecaj militoj, la vivigo kantis per la sonora liro de la trobadoroj. Ne plu estis la religia sento la sola temo: arda inspiro disvolvis amajn historiojn, korteganajn laŭdojn, rakontojn pri mirigaj aventuroj.

La trobadora poezio komenciĝis en Provenco. Baldaŭ post la Provencaĵoj, ekfloris la trobadoroj Katalunaj. Tiom granda estis la Provenca influo, ke la trobadoroj katalunaj verkis en lingvo duone kataluna kaj provenca, miksitaj kaj konfuza ĝis tia grado, ke en kelkaj okazoj estus malfacile difini, per nur la helpo de la lingvaĵo, la devenon de la multnombraj aŭtoroj florintaj dum la “periodo trobadoreca”.

Estas konsiderataj kiel Provencaĵoj la jenaj trobadoroj:

Bernat de Ventadorn (1140-1195), unu el la plej bonaj trobadoroj, meritinta grandajn laŭdojn de Petrarca. Li naskiĝis en la kastelo de Ventadorn, filo de humila servisto. Jam en sia infaneco li verkis versaĵojn, kiujn li dolĉe kantadis. La ge-grafoj de Ventadorn faris lin paĝo. Li dediĉis poemojn al la grafino Agnès de Montluzó. Li vizitis kelkajn Eŭropajn kortegojn. En 1194 li eniris kiel monaĥo en la abatejon de Dalon.

Bertran de Born, vivinta en la lastaj jaroj de la XII^a jarcento, vicgrafo de Hautefort, militisto, unu el la herooj de la epoko. Li ŝatis kruelajn kaj sangajn scenojn. Facila versfaranto, li verkis poemojn politikajn, satirajn kaj amajn. Li akre verkis kontraŭ la Reĝo Alfonso II de Aragono. Li partoprenis en multnombraj militoj. En la lastaj jaroj de sia vivo li fariĝis monaĥo. Dante pentris lin (en la Infero) senkapigita kaj tenanta sian kapon per

la mano, kvazaŭ lanterno, kiel puno al la krueleco kaj malpacemo de lia vivo.

Pere Vidal de Tolosa (1175-1215), de tre ekstravaganca vivo. La kavaliro de S. Gilles truigis al li la langon pro liaj malhonorigaj diroj. En Xipre li edziĝis kun grekino, ĉar oni diris al li ke ŝi estas nevino de la imperiestro. Por komplezi sinjorinon, Lloba de Penautier, li, vestita per lupa felo, ĉasigis sin de siaj hundoj, kiuj preskaŭ mortigis lin. Ĉe la morto de Ramon de Tolosa, li sin vestis nigre, detranĉigis la voston kaj la orelojn al siaj ĉevaloj, li kaj liaj servistoj tondis sian hararon, kaj tiam li verkis belan kaj faman kanzonon. Malgraŭ siaj strangaĵoj li estis delikata poeto kaj lasis pli ol 70 verkojn.

Guerau de Borneil (1175-1220), naskiĝinta de modestaj gepatroj en kastelo de la grafo de Limoges. Tre bona trobadoro. Dum vintro li studadis kaj somere li trakuradis kortegojn kaj kastelojn kun du ĵuglaroj kiuj kantadis liajn verkojn. Siajn gajnojn li donadis al la almozuloj. En liaj poemoj estas freŝeco, emocio kaj religia fervoro. Li lasis pli ol 60 pecojn.

Riambau de Vaqueres (1180-1207), filo de altranga nobelo. Li eniris en la servon de la princo Vilhelmo IV de Orange kaj poste transloĝiĝis en Italujon. La markizo de Montferrato lin protektis kaj faris kavaliro. Li dediĉis kelkajn poeziojn al Beatrice de Montferrato, fratino de la markizo. Li partoprenis krucmiliton kaj en Palestino daŭrigis la verkadon de belaj poemoj. Liaj verkoj estas tre originalaj.

Guerau de Riquier (1250-1294), naskiĝinta en Narbona. El liaj abundaj verkoj konserviĝis 90 poemoj. Li kulturis ĉiujn versaĵojn kaj en ĉiuj sukcesis. Li dediĉis versaĵojn al la filo de Jakobo I kaj verkis faman laŭdon al Katalunujo, kies strofoj finiĝas per la versoj:

“En Cataluenha la gaia,
Entr'els Catalás valens
E las donas avinens.”

Pere Cardinal, vivinta en la lasta duono de la XII^a jarcento, poeto kaj filozofo. Li devenis de nobela familio. Oni destinis lin esti kanoniko, sed li preferis esti trobadoro. Li verkis moralajn poemojn kaj energiajn satirojn. Malgraŭ tiuj satiroj, li estis de ĉiuj estimata pro sia talento kaj bonkonduto. El liaj verkoj distingiĝas laŭdo al la bonfarmo.

Arnau Daniel, bonega poeto, kies plej bonaj verkoj parte maperis. Li estas aludita de Dante, en la Purgatorio, kiel delikata

kantinto de amaj sentoj. Li ŝatis vortludojn kaj kombinaĵojn en siaj poemoj. Li finis sian vivon en monaĥejo.

Aimeric de Peguillá, filo de komercisto pri ŝtofoj en Tolosa. Li loĝis en Katalunujo, en la domo de la kavaliro poeto Guillem de Bergadà. Li brilis en la kortego de la reĝo Petro la Katolika kaj poste iris Italujon. Ĉie li estis protektata de reĝoj kaj altranĝuloj kaj mortis meze de ĝenerala admiro. Liaj verkoj, patriotaj kaj amaj, estas tre dolĉaj kaj melankoliaj.

Aliaj famaj Provencaj trobadoroj estis: *Guillem de Poitiers*, mortinta en 1127, eble la unua trobadoro; *Jofre Rudel* (1140-1170); *Gauselm Faydit*; *Berenguer de Provença*; *Ramon de Miravall*, tiel fama pro siaj versaĵoj kiel pro siaj aventuroj; *Guiu Folquet de Marsella*, trobadoro, pastro, episkopo, kardinalo kaj papo kun la nomo Clement IV.

La ĉefaj trobadoroj Katalunaj estas la jenaj:

Berenguer de Palol (1136-1170), naskiĝinta en Rusiljono dum la regado de la grafo Ramon Berenguer IV de Barcelona, estas konsiderata kiel la unua trobadoro pure kataluna kaj distingigis pro sia facileco kaj dolĉeco. Konservigis dek-ses el liaj poemoj kaj eĉ la muziko de kelkaj el ili.

Jen fragmento de unu el liaj belaj kanzonoj, en kiu li kantas sian amatinon en komenco de somero:

“Ab la fresca clardat
Que mou del temps serè,
Dona, e ab l'estat
Que renovela e ve
Ai tot mon cor pauzat
En la vostra mercè;
E quar tant ai estat
Que vezer no us volia
Si la colpa és mia
Et ieu m'o ai comprat
.....
Chanso, a Na Maria
Digas qu'ieu chantaria
Si'n sabi'aver grat.”

Remarkinda estas ankaŭ alia kanzono, kies unua strofo diras:

“S'ieu savi'aver guizardò
De cansó, si la fazia
Adés la comensaria
Cuendeta de motz e de so.”

Guillem de Bergadà (proksimume vivinta en la jaroj 1145-1200), plej aĝa filo de la vicgrafo de Berga, verkis abundajn poemojn el kiuj konservigis 35, plejparte satiroj kontraŭ nobeloj kaj pastroj. Li estis amiko de la ĉefaj trobadoroj kaj vizitis kelkajn kortegojn. Tre pasiema kaj kuraĝa, li falis en plej malbonan vivadon. En 1174 li perfide mortigis la nobelon Ramon Folch de Cardona; li senhonorigis sian propran fraton, li perforte eniris en monaĥinejon, li fariĝis bandita kapitano kaj fine mortis senhore ĉe la manoj de soldato en trinkeja disputo...

Flanke de tiaj malbonaj kvalitoj, li havis veran poetan talenton kaj uzis riĉajn esprimojn. El liaj verkoj, kelkaj estas belaj amkanzonoj, kiel tiu komenciĝanta per:

“Al temps d'estiu quan s'alegron l'auzel...”

Alfons I de Catalunya (1152-1196), reĝo, filo de la Barcelona grafo Ramon Berenguer IV kaj de Petronila de Aragono, granda amiko de la trobadoroj kaj mem trobadoro, laŭ kronikoj aludantaj tiun reĝon kiel *aquell que trobet*. Oni atribuas al li kelkajn poemojn, sed nur pri unu oni scias tute certe ke ĝi estas verkita de li. Ĝi estas tre bela kaj komenciĝas per la sekvanta strofo:

“Per mantas guizas m'es datz
Joys e deport e solatz;
Que per vergiers e per pratz,
E per fuelhas e per flors,
E per temps qu'es refrescatz,
Vei alegrar chantadors:
Mas al meu chan neus ni glatz
No m'ajuda, ni estaz,
Ni res, mas Dieus et amors.”

Guillem de Cabestany, naskiĝinta en Rusiljono dum la lasta duono de la XII^a jarcento, estas unu el la plej famaj trobadoroj, ne nur pro la evidenta merito de siaj poemoj, sed ankaŭ pro siaj amaj aventuroj kaj la legendo pri lia morto.

Laŭ antikva biografio, Guillem de Cabestany enamigis je la edzino de riĉa barono Raimon de Castel Rossilhó kaj dediĉis al ŝi kelkajn poemojn kun vualitaj aludoj. La edzo mortigis la trobadoron, rostigis lian koron kaj prezentis ĝin ĉe la manĝotablo al sia edzino. Kiam ŝi estis manĝinta ĝin, la edzo klarigis pri la afero, montrante la kapon de la mortigita amanto kaj demandante ĉu lia koro plaĉis al ŝi. Ŝi respondis ke la koro de la amita trobadoro estis tiel bongusta, ke neniam plu ŝi volos meti alian manĝaĵon en sian buŝon, kaj sin ĵetis el kastela fenestro.

Se la tragika morto ne estas pruvita, vera estis la amo de la trobadoro kaj la aludoj en la poemoj. Du el ili elmontras la realecon de tiu amo, ĉefe tiu kiu komenciĝas:

"Lo dous cossire
Que-m don amors soven,
Domna-m fai dire
De vos mainh vers plazen."

Guillem de Cabestany estis trobadoro pasiema, sentimentala kaj tre delikata. En 1914 oni faris eldonon de ĉiuj liaj verkoj. Pri lia vivo kaj legenda morto verkis romanon la moderna kataluna verkisto Pompeu Gener, kiu, por doni pli da ĉarmo al la rakonto, verkis ĝin ne en la moderna lingvo, sed en la mezepoka lingvaĵo uzita de la trobadoro.

Guerau de Cabrera, vicgrafo, kies poemoj estas verkitaj post la jaro 1170. Lia ĉefa verko estas akra satiro kontraŭ iu ĵuglaro nomita Cabra. Tiu satiro pritraktas la konojn necesajn al bona ĵuglaro kaj enhavas aludojn al tiutempaj trobadoroj.

Ramon Vidal de Besalú, naskiĝinta en la mezo de la XII^a jarcento, verkis, krom kanzonoj, novelojn en verso, kaj ankaŭ poetikajn traktatojn "Razós de trobar", kiu atingis grandan famon. Ramon Vidal estis ne nur bona poeto, sed bona gramatikisto. Aparte de lia libro pri poetiko, lia ĉefa verko estas longa kaj interesrakitado, kiu komenciĝas:

"Abril issí y May intrava
e cascús del auzels cantava..."

Hug de Mataplana (mortinta en 1213), ido de unu el la plej altrangaj nobelaj familioj. La kastelo de Mataplana, ĉe la montaroj de Ripoll, estis dum multaj jaroj rendevuejo de sinjorinoj kaj kavaliroj, de trobadoroj kaj ĵuglaroj, kaj tie oni reproduktadis la Kortegojn de Amo, de Provenco. Tiaj festoj daŭris ĝis kiam la barono Hug, forlasante la trobadoran vivon, akompanis la reĝon Petro II al la militoj de Tolosa kaj mortis kun li en la batalo de Muret.

Konserviĝis el tiu-ĉi trobadoro kelkaj poemoj; la plej bona estas dialogo de la poeto kun hirundo:

"Arondele: de ton chantar m'azir.
Què vols? què quier? que no'm laissas dormir..."

Arnau el Catalá, floris dum la epoko de la regado de Jakobo I al kies edzino Elianor li dediĉis du verkojn. Konserviĝis de li naŭ poemoj, el kiuj la plej bona sendube estas tiu, kiu komenciĝas:

"Ben es razós qu'eu retraya
una chansoneta gaya..."

Cerveri de Girona (1250-1280), vivinta en la epoko de Jakobo I, eble la lasta trobadoro, ĉar post li la tiamaĵaj poetoj jam deflankiĝis de la speciala maniero "trobadoreca" en la verkado de poemoj. Lia verkaro estas abunda; pli ol 120 poemoj konserviĝis. Li ŝatis ornamaĵojn kaj simbolismojn. Unu el liaj plej famaj poemoj estas tiu prezentanta plendon al la reĝo pri la malbono al li kaŭzita de lia amatino. Ĝi komenciĝas:

"Francs reys humils e cars e d'amoros semblan:
Car devez tener dreit sobre cels qui tort fan,
A vos me venc clamar d'un bel cors benestan
Qui m'ha tan gran mal fait qu'anc res no me'n fes tan."

Alia poemo lia estas rimarkinda, pro tio ke ĝi plene konsistas el antitezoj. Jen la unua strofo:

"No val iurars lai on falh lialtatz,
Ni rasonars en cort que dreg soan,
Ni demandars lai on renh cobeitatz,
Ni castiars qui vergonha non blan;
Ni val mercès lai on falh chauzimens,
Ni chauzimens lai on mals es a tria,
Ni belhs arnés entr'els crois lagz tenens,
Ni digz cortés en loc de vilania."

Multajn aliajn trobadorojn ni povus ankoraŭ citi. Per la rakontitaj anekdotoj, per la transskribitaj fragmentoj, oni povas havi ideon pri la karaktero de tiu iom konvencia poezio, prefere pri amo, kiun la trobadoroj kreis kaj, ĉefe en la unuaj tempoj, kantadis en akompano de la liro ĉe palacoj kaj kasteloj. La trobadoroj, kies verkojn ni pritraktis nur en malgranda parto, atingis grandan valoron kaj la influo de ilia skolo daŭras ankoraŭ nuntempe. Oni rimarku ke ilia poezio disvolviĝis antaŭ ol Dante verkis la "Divina Commedia", kiam la latinidaj lingvoj ĵus ekfloris. Certe iliaj kantoj estas unu el la voĉoj kiuj por eterne plej pure parolos pri tiu forpasinta epoko, samtempe plena de ĉarmoj kaj de terurajoj.

La troa abundeco de trobadoroj alportis ilian dekadencan. En la Kortegoj kaj ĉie ili estis akceptataj de sinjorinoj kaj kavaliroj tiel afable kaj ĝentile, ke multaj sin dediĉis al la arto "trobi", sen sufiĉa talento kaj inspiro, kaj per tio senkreditigis la noblan poetan metion. Ankaŭ kontribuis al tiu dekadenco la kreskantaj subtileco kaj rafiniteco de la lingvaĵo, kaj diversaj historiaj kaŭzoj.

Por eviti la iom-post-ioman malaperon de la trobadora poezio, oni starigis en Toulouse kaj Barcelona, la famajn festojn nomatajn Floraj Ludoj kie oni premiis la plej bonajn poemojn per floroj naturaj, oraj kaj arĝentaj. La unuan dimanĉon de Majo de 1324 okazis en Toulouse la unuaj Floraj Ludoj, en Provenĉala

lingvo. Nelonge poste, sub la regado de la kataluna reĝo Joan I, *l'Amador de la gentilesa*, komencis okazi en Barcelona la Floraj Ludoj katalunaj, tiu ĉarma festo kiun la modernaj Katalunoj restarigis por restarigo de sia lingvo en 1859, kaj kiun la katalunaj esperantistoj organizis en Esperanto jam dekdufoje, okaze de la ĉiujaraj kongresoj de "Kataluna Esperantista Federacio".

PERIODO "NACIA", AU DE LA NACIA FORMIĜO (XIII-XIV)

(De Ramon Lull ĝis Bernat Metge: 1272-1388)

Post la lasta kataluna trobadoro Cerverí de Girona, floris kelkaj pluaj poetoj nomataj *disciploj de la trobadoroj*. En tiu epoko samtempe naskiĝis la kataluna literatura prozo.

Ĝi rapide disvolviĝis en ĉiuj branĉoj: per la Kronikoj, perloj de la kataluna literaturo, verkitaĵoj de la reĝoj *Jaume I* kaj *Pere III* kaj la historiistoj *Bernat Desclot* kaj *Ramon Muntaner*, per tradukoj el fremdaj lingvoj kaj poste per originalaj verkoj. Ĝis nun la kataluna lingvo estis riĉa nur en poezio. De nun ĝi riĉiĝas en prozo, plene formiĝante kaj perfektigante.

La filozofo *Ramon Lull* estas la unua kiu forlasas la latinan lingvon por alpreni la vulgaran, kaj li fariĝas kreanto de la alta kataluna prozo en siaj abundaj verkoj. La kataluna lingvo estis do la unua latinida uzata por filozofio.

Samtempe, per tradukoj kaj per originalaj verkoj, *Arnau de Vilanova* ekuzas la katalunan lingvon en scienco. Apud tia scienca literaturo, floras ankaŭ katalunaj verkoj pri magio kaj astrologio.

La antikveco de la kataluna Parlamento, antaŭa al ĉiuj Eŭropaj, devigas la fruan vekigon de la politika oratorarto en Katalunujo, plena de skolastika gusto. Reliefiĝas la figuroj de la reĝoj *Jaume II* kaj *Pere el Ceremoniós*, per siaj famaj "proponoj".

La religia literaturo estas kulturata de tri grandaj figuroj, eminentaj prozistoj: *Lull*, mistikulo; *Bernat Oliver*, asketo; *Francesc Eximenis*, enciklopediulo. Iĝas pli kaj pli oftaj tradukoj el la Biblio kaj el aliaj verkoj de klasikaj lingvoj. La kataluna lingvo komencas forpuŝi la latinan en la publikaj skribaĵoj kaj ĉiel pretiĝas al sia posta ora epoko.

Ramon Lull (1235-1316), naskiĝinta en la Balearaj Insuloj, filozofo, poeto, mistikulo, plej giganta figuro en la kataluna Literaturo, verkis multnombrajn librojn katalune, latine kaj arabe. Liaj unuaj poemoj amaj, trobadoraj, estas tute malaperintaj kaj konserviĝis nur la mistikaj. Li montriĝas granda poeto ne nur en la verkoj rimitaj, kiel en "Desconhort", "Els cent noms de Déu" k. a., sed ankaŭ en kelkaj libroj en prozo. Tiel, kiel liaj rimoj, valoras

la verkoj "Blanquerna" aŭ "Fèlix" aŭ la ĉarma "Libre de Amic e de Amat". El liaj verkoj pri Mistiko, Naturscienco, Juro, Kemio, Poezio, k. c., distingiĝas la latina "Ars magna" kaj la katalunaj "Libre de Contemplació", de monumenta karaktero, eble la plej karakteriza de la aŭtoro; "Libre de Santa Maria", kun 30 ĉapitroj; "Arbre de sciencia"; "Doctrina pueril"; kaj aliaj.

Amaso da verkoj ekzistas en diversaj lingvoj pri la ecoj kaj multflanka agemo de Ramon Lull, kaj ĉefe pri la filozofio "Iuliana" aŭ "Iulismo".

Jaume I el Conqueridor (verkis en 1274) enkondukis la oficialan uzon de la kataluna lingvo anstataŭ la latina en la dokumentoj kaj juraj agoj kaj mem verkis katalune sian faman "Kronikon" pri la famaj agoj de lia regado. Per la konkeroj de Valencio kaj Balearaj Insuloj, ĝis tiam okupitaj de la Araboj, li plivastigis la katalunan teritorion. Li starigis templojn, fondis universitatojn, reformis la leĝojn, sed ĉefe protektis la lingvon kaj literaturon. Krom la "Kroniko", li mem verkis la "Libre de Saviesa", destinita al edukado de princo. Lia prozo montras jam grandan fiksecon de la kataluna lingvo kaj elegantan sintakson.

Bernat Desclot (verkis en 1285) estas fidela historiisto de la mezepokaj tempoj. Li nur rakontas ĉeestitajn faktojn en maniero tre sobra, ne zorgante fari literaturajn filigranojn. Liaj kronikoj estas tre interesaj, en lingvo pura kaj preciza.

Ramon Muntaner (1265-1336) estas konsiderata kiel la nacia historiisto kataluna. Li, kiel militisto, ĉeestis la historiajn agojn rakontitajn. Li partoprenis tridek-du batalojn. En sia 60-jara aĝo li komencis skribi sian "Kronikon". Ĝi enkalkulas ses regadojn, pli ol duonon da jarcento, de Petro la Katolika ĝis Alfonso III^a de Katalunujo. Ĝi estas interesa precipe pro la rakontado de la katalunaj militiroj al Oriento. Ramon Muntaner, krom historiisto, estas granda literaturisto. Li vive pentras, reliefigas la figurojn kaj poeziigas la faktojn. Sed tamen li estas verama kaj precizema.

Pere III de Catalunya (1335-1387), reĝo tre energia, estis samtempe poeto, oratoro kaj kronikisto. Kiel poeto, li verkis poezion al sia filo Johano, kun riproĉoj pri lia edziĝo, kiu komenciĝas:

"Mon car fill, per Sant Anthoni
juram quets mal consellat..."

Li ankaŭ verkis "sentencon" inter poetoj kaj konsilojn al kavaliroj. Kiel oratoro li estis tre lerta kaj montris subtilecon de juristo kaj tre instruita homo. Kiel kronikisto, li verkis, kun helpo de sekretario, kronikojn pri sia propra regado, pri la konkero de Sicilio kaj ĝeneralan pri la "Aragonaj Reĝoj kaj Barcelonaj Grafoj".

PERIODO "KLASIKA", AU DE LA NACIA PLENECO
(XIV-XV)

(De Bernat Metge ĝis la morto de Roiç de Corella: 1388-1500)

Ĉi-tiun periodon karakterizas plena florado de la prozo kaj disvolvigo de la poezio en propra maniero kaj ne plu sub la influo de la provenca skolo. La tuta lingvo iom post iom foriĝas de la provencaj arĥaismoj kaj sin jetas sub la novan influon de la literaturo itala.

Petrarca estas unue konata pli per siaj latinaj verkoj ol per la italaj. Lia latina teksto de "Valter e Griselda" estas tradukata de la plej granda kataluna prozisto Bernat Metge. Liaj italaj poemoj influas la katalunajn poetojn samepkaj Jordi de Sant Jordi kaj Llorenç Mallol. Dante Alighieri sentigas sian influon en la verkoj "Gloria d'amor", de Rocaberti (1461) kaj "Curial e Güelfa" (1540) de nekonata aŭtoro kataluna. Lia "Commedia" estas plene tradukata de la kataluna samtempulo Andreu Febrer. Boccaccio ankaŭ havas en kataluna lingvo abundajn tradukojn, inter ili plenan tradukon de la "Decamerone". La influo itala krome popularigas la konon de la latina klasikeco.

La kataluna prozo riĉiĝas per la majstraj verkoj "La Sonĝo", tre filozofia, plena de mezepoka karaktero, de Bernat Metge; "Tirant lo Blanch", romano de kavalircaj aventuroj, de Johanot Martorell, kiu poste estos tre laŭdata kaj imitata de la hispana Cervantes, en la fama "Don Kihoto"; "Curial e Güelfa", kaj aliaj.

Ankoraŭ pli kaj pli ellaboriĝas la lingvo per tradukoj ĉiuspecaj, ekzemple: la "Tragedioj" de Sèneca, estas tradukataj de Antoni de Vilaregut en 1396; kompleta traduko de la Biblio estas presata en 1478.

La historia prozo daŭrigas sian disvolvigon per tradukitaj kaj originalaj verkoj; grandaj politikaj oratoroj de tiu-ĉi epoko estas la reĝo Marti I, l'Humá (1405) kaj la Kardinalo Margarit (1454); fama religia predikisto estas Sankta Vicents Ferrer (1355-1419).

La poezio en tiu-ĉi epoko ricevis helpon de la starigo de "Akademio pri la Bela Scio" en la jaro 1393, kiu signas la finon de la poezio antikva, provenca kaj trobadorca. De nun la poezio estos plene kataluna, kun iom da itala influo, kaj brilos la nomoj de Auziás March, poeto de la amo spirita; Jordi de Sant Jordi, la kataluna Petrarca; Jaume March, aŭtoro de fama "Rimaro"; Jaume Roig, aŭtoro de "Spill" kun 12.000 versoj, monumento de satira literaturo; Andreu Febrer, tradukinto de Dante; Llorenç Mallol, Dalmau de Rocaberti, Fra Anselm Turmeda, Guillem de Masdovelles, Roiç de Corella, kaj aliaj.

Bernat Metge (1350-1412) estas konsiderata kiel la ĉefa prozisto kataluna, pro siaj eleganta stilo kaj pura lingvo. Lia ĉef-

verko estas "La Sonĝo", modelo de konstruado kaj klasika gusto. Li ankaŭ verkis "Libre de mals amonestaments", "Libre de Fortuna e Prudència" kaj tradukon de "Història de Valter e Griselda" el la latina teksto de Petrarca.

Johanot Martorell (1460) verkis "Tirant lo Blanch", fama libro de kavalirajoj, unu el la plej bonaj en sia speco, kaj sendube la plej diskreta, ĉar en ĝi ne troviĝas amaso da supernaturaj mirindaĵoj. Ĝi enhavas scenojn de plej kruda realismo kaj riĉan leksikonon popularan, abundajn proverbojn kaj plej belajn frazojn.

Auziás March (1393-1459) estas konsiderata kiel la ĉefa poeto kataluna, same kiel Bernat Metge estas la ĉefa prozisto. Li profunde konis la klasikajn aŭtorojn kaj tre ŝatis la Filozofion. Kvankam altega poeto, lia poezio foje estas iom konfuza por la moderna leganto ne familiariĝinta kun la doktrinoj kaj frazeologio de lia epoko. Oni devas mediti la poezion de Auziás March, granda psikologo, sed je ĉiu nova legado ĝi montras novajn ĉarminojn. Li kantis la amon, ne la amon korpan, laŭ la maniero trobadorca, sed la amon plej altan, puran kaj spiritan. Jam en sia epoko li estis tre fama. Pro lia profundeco kaj amo al simbolismoj, oni komparis lin al Dante Alighieri.

Jordi de Sant Jordi (unua duono de la XV^a jarcento), kavaliro-poeto, lasis 18 tre belajn kaj inspiritajn poemojn. Lia poezio estas ama kaj sentimentala. Lia stilo estas klara, brila, alloga. Liaj poemoj "Enyorament", "Cançó d'opposits", "Debat entre'ls ulls, el cor e'l pensament" estas majstraj verkoj.

Multajn aliajn aŭtorojn ni povus ankoraŭ prezenti, kiuj floris en tiu brilega sed nedaŭra ora epoko de la kataluna literaturo.

Amaso da verkoj katalunaj estis tradukata en fremdajn lingvojn dum tiu tempo, multe antaŭ ol la dekadenco komenciĝis.

Por vidi la panoramon de tio, kio estis la kataluna literaturo en la Mezepoko, ni tradukos trafajn vortojn de la eminenta kataluna kritikisto Lluís Nicolau d'Olwer:

"La literaturo kataluna ne estas literaturo fragmenteca—kulturanta nur kelkajn specojn kaj forlasanta la aliajn, akceptanta la fremdan produktadon, kiel la antikva literaturo galicia-portugala—nek prezentas kun interrompoj verkojn de ĉiu speco: ili en ĝi naskiĝas, progresas, reciproke influas sin kaj mortigas, sekvante la fatalan leĝon de literatura evoluo. La kronikoj konsistigas kontinuan serion de Jaume I (1274) al Carbonell (1496); Guillem de Cervera (1227), Ramon Muntaner (1325) kaj Bernat Metge (1398) havigas materialojn al "Tirant lo Blanch" (1460); poetoj de la XV^a jarcento imitas kaj glosas trobadorojn de la XII^a; la libro "Blanquerna", verkita de Ramon Lull ĉirkaŭ 1284, revivas en la

"Spill de la vida religiosa" post 1515; Eximenis (1400) aludas versojn de Cerverí de Girona (1272), kaj Pax (post 1420) aliajn de Guillem de Cervera; kelkaj pecoj de la "Spill" de Jaume Roig (1460) respondas al aliaj de la "Songò" de Bernat Metge; jam en la XVI^a jarcento (1538) Francesc d'Oleza verkas "Art de trobar" kompareblan al tiuj de la jarcentoj XII^a kaj XIII^a; Pere Serafi (1565), per multaj el siaj poemoj, ŝajnas prokrastiginta trobadoro; kaj ankoraŭ poste imitas la manieron de Auziàs March lia pranepo de Cervera (1601) kaj la kanoniko Jeroni Ferrer de Guisona (1615)."

"En la literaturo kataluna kontribuas ĉiuj sociaj klasoj: nobeloj kiel Guerau de Cabrera, la vicgrafo de Rocaberti kaj la samfamilianoj March; civitanoj kiel Bernat Metge kaj Jaume Roig; militistoj kiel Pere Salvatge, Muntaner kaj Jordi de Sant Jordi; pastroj kiel Guillem Nicolau kaj Roig de Corella; scienculoj kiel Arnau de Vilanova, Sesplanes kaj Tresvents; monaĥoj kiel la anonimuloj de Ripoll kaj Sant Cugat; religiuloj kiel Eximenis, Canals kaj la fratroj Ferrer; judoj kiel Jafuda Bonsenyor kaj la multmembra familio Cresques; konvertiĝintoj kiel Anselm Turmeda. Se multaj literaturoj prezentas kiel la kataluna tiel grandan nombron da burĝoj literaturistoj, neniu prezentas kiel ĝi tiomajn nomojn de reĝa deveno. La Barcelona dinastio, de Alfons I el Cast ĝis Martí l'Humà (1162-1410), estas longa serio, preskaŭ seninterrompa, de princoj literaturamantaj: estis poetoj Alfons I, Pere I, Pere II kaj Joan I; kronikisto, Jaume I; poeto, kronikisto kaj oratoro, Pere III; poetoj kaj oratoroj, Jaume II kaj Martí; nomoj al kiuj devas esti aldonataj tiuj de iliaj parencoj Frederic III de Sicilia, Constança de Mallorca, la reĝido Pere kaj Jaume II d'Urgell.

Sekve de la kunlaborado de tiom diversaj sociaj klasoj, la kataluna literaturo estas diametre kontraŭa al la unutona produktado de iu cenaklo. Reflektante kontraŭajn ideojn kaj sentojn, ĝi skribas paĝojn de varma mistikismo, de skolastika subtileco, de semida sobreco, de kruelega satiro, de feŭdalaj malamoj kaj venĝoj, de amo kuntenata aŭ elverŝiganta, de firma lojaleco, de patriota fiero. Kaj ĝuste tial, la kataluna literaturo estas tiu kiu kalkulas plej abundajn kaj heteroklitajn tradukojn, de la Biblio al la Korano, de Cicerono al Bocaccio, de Alfonso la Saĝa al Alain Chartier, de Ptolomeo al Avicena, de la "Urbo de Dio" al la "Heroidoj" de Ovidio."

Post tia brila estinteco, estas senutile ke oni volu ignori la katalunan estantecon, kaj pli ankoraŭ eviti la katalunan estantecon, proksiman kaj promesprenan.

PERIODO DE LA DEKADENCO (XVI-XVII-XVIII)

(De Roig de Corella ĝis Bonaventura Carles Aribau: 1500-1833)

En tiu longa periodo, estas du partoj: en la unua (1500-1608) la dekadenco komenciĝis; en la dua (1608-1833) ĝi fariĝis plena, absoluta.

En la unua parto, briilas la poetoj Boscà kaj Pere Serafi, kaj la historiisto Pujades. En la dua, Vicents Garcia kaj Francesc Fontanella. Meritas esti memorata ankaŭ la nomo de Pastro Baldiri Reixach, aŭtoro de grava pedagogia verko.

Ne mankas en tiu periodo sufiĉe da verkistoj en verso aŭ en prozo, sed, krom la menciitaj, ili ne estas rigardataj kiel valoraj.

La produktado de la katalunaj verkistoj iom post iom malpliĝas, malaperas plenaj branĉoj de la literaturo, ekmortiĝas la nacia spirito kaj la tuta lingvo malriĉiĝas. Tiaj faktoj signas la komencigon de la influo kastila aŭ hispana. La kataluna literaturo—Katalunujo—, kiu estis malfermata al ĉiuj influoj, kiu spiris ĉiujn blovojn de la kulturo, tiam turnis la dorson al Eŭropo kaj helblindiĝis rigardante la gloron lingvan, politikan kaj militistan de Kastilujo. La renesanco greka-latina, la dua renaskiĝo itala kaj la granda renaskiĝo franca neniel influas Katalunujon. Ĝi sentas nur unu solan influon: la kastilan.

Diversaj historiaj faktoj, unu post la alia—komence la eltrovo de Ameriko kaj la dekadenco de la Mediteranea Maro, poste la tendenco al starigo de grandaj imperioj—, kontribuis al la Kataluna dekadenco lingva, politika, ekonomia, ĉiuspeca... Kastilujo, la lando al kiu Katalunujo kuniĝis per reĝaj edziĝoj, produktas literaturon riĉan kaj vastegan, kiu invadas la tutan Iberian duoninsulon, ĝis la orienta marbordo—Katalunujo, kaj ĝis la okcidenta—Portugalujo. Tiam la lingvo kastila fariĝas hispana, kaj Hispanujo—sinonimo de Kastilujo. Unu fojon ankoraŭ estis pravigata la diro: "La lingvo postiras la imperion".

Sed la dekadenco de la kataluna spirito ne havis nur ĝenerallajn, historiajn, moralajn kaŭzojn: per amaso da agoj kaj leĝoj ĝi estis materie malhelpata kaj subpremata. Akriĝojn de tiu dekadenco signas la jaroj 1640, dato de fama revolucio kontraŭ la kataluna vicreĝo, kaj 1714, dato de la falo de la Barcelona ĉefurbo, post kelkmonata sieĝado, sub la povon de la kunigitaj armeoj de la reĝoj de Hispanujo kaj de Francujo.

La kataluna literaturo longtempe vivadis perdinte preskaŭ ĉion propran: ĝiajn malmultajn verkojn makulis vortoj hispanaj, frazkonstruoj hispanaj. Sed, komence de la XIX^a jarcento, post la Napoleonaj militoj, jam la kataluna lingvo ŝajnis rekonsciiĝi; la kataluna popolo vekigiĝis el sia dormado; la vento de la romanti-

kismo blovis la cindrojn de la kataluna literaturo, kaj la poeto *Bonaventura Carles Aribau* (1), per sia "Odo al la Patrujo", donis la unuan vokon por renaskiĝo en la jaro 1833.

PERIODO DE LA RENASKIĜO (XIX-XX)

(De post *B. C. Aribau*: 1833)

La alvoko de Aribau al la malnova lingvo de la praavoj, por ke ĝi eliru el la tombo kaj "laŭtiĝu tra la mondo", estis sekvata de bela realeco.

Baldaŭ aperis novaj poetoj. La plej bona, la plej konscia el ili estis *Joaquim Rubió i Ors*, kiu en 1841 kolektis siajn poemojn per la libro "Lo Gaiter del Llobregat".

Ankaŭ dediĉis sin al tiu renaskiĝanta poezio *Antoni de Bofarull*, kiu aperigis en 1858 sian volumon "Los trobadors nous" kaj poste historion de Katalunujo kaj ankaŭ la unuan longan modernan novelon en kataluna lingvo; *Victor Balaguer*, la fama fondinto de la Biblioteko-Muzeo de Vilanova i Geltrú, kiu eldonis en 1859 "Los trobadors moderns"; *Francesc Pelai Briz*, la unua kataluna tradukinto de la provenca poemo "Mireio" de Mistral, ĵus post ĝia apero.

Al tiu literatura movado en Katalunujo, respondis en la Balearaj Insuloj *Marian Aguiló*, unua studinto de la popolaj kantoj kaj konscia laboranto en la repurigado de la lingvo; en Valencio, *Teodor Llorente*, eminenta ĵurnalisto kaj sentoplana poeto; en Rusiljono, *Justí Pepratx*, kiu poste estos franca tradukanto de la "Atlantido" de Verdaguer.

Post tiaj sukcesaj komencoj, estis jam tempo realigi la revon de Rubió i Ors: la restarigon de la ĉiujara festo de la Floraj Ludoj, kiu okazis la unuan dimanĉon de Majo 1859.

La prezidanto de la Juĝantaro de la unuaj Floraj Ludoj estis la eminenta verkisto kaj literatura historiisto *Manel Milà i Fon-*

(1) Ni nepre devas menciigi ke *B. C. Aribau*, la unua restariginto de la kataluna literaturo, arde laboris por la ideo de lingvo internacia, ne verkante difinitan projekton, sed nur propagandante. Li ankaŭ estis pioniro de la komenca stenografia movado, kaj lasis bonegan kaj dum multaj jaroj uzitan stenografian sistemon.

Samtempe kiel Aribau, la kataluno *Sinibald de Mas* ankaŭ laboris por la ideo de lingvo internacia kaj publikigis verkon en franca lingvo "Mémoire sur la possibilité et la facilité de former une écriture générale au moyen de laquelle tous les peuples de la terre puissent s'entendre mutuellement sans que les uns connaissent la langue des autres", akompanatan de provoj de skribado en la proponita ideografia sistemo, lerta imitaĵo de la hina lingvo.

tanals, kiu faris paroladon timeme klarigantan la celon de la restarigata festo.

La premiitaj literaturaĵoj ne estis tre valoraj: la kerno de la festo estis la paroladoj de la prezidanto *Milà i Fontanals* kaj de la sekretario *Antoni de Bofarull*, kiuj pli-malpli kaŝe jam enhavis la premisojn kies sekvoj estis la kataluna movado literaturo, lingva, politika, tiam komenciĝanta kaj poste atinginta gravecon eĉ ne imagitan de ĝiaj unuaj iniciatintoj.

La Floraj Ludoj povas esti dividataj en du epokojn: de la restarigo en 1859 ĝis 1877, jaro kiam estis premiata la poemo "Atlantido" de *Jacint Verdaguer*, kaj de 1877 ĝis nun.

En la unua epoko, la partoprenintoj de la Floraj Ludoj disvolvis en lingvo ankoraŭ iom balbutanta la ĉiamajn temojn de la devizo *Patria, Fides, Amor*. De post Verdaguer, la unua granda poeto moderna, la kataluna literaturo konstante fariĝas pli kaj pli riĉa kaj kompleta.

Post la unuaj poetoj premiitaj en la Floraj Ludoj, el kiuj estas rimarkindaj, krom la citita Verdaguer, konsiderata kiel la moderna nacia poeto kataluna, ankaŭ *Jaume Collell* kaj *Anicet de Pagès de Puig*, baldaŭ aperis la unuaj prozistoj.

Narcís Oller, la unua moderna novelisto kataluna, verkis kelkajn grandajn novelojn tradukitajn poste en sep Eŭropajn lingvojn, kaj tradukis siavice en la kataluna kelkajn librojn de Tolstoj, Turĝeneff kaj Paulowsky. *Marian Vayreda* kaj *Ramon Casellas*, sekvante la literaturan guston de tiu tempo, verkis ankaŭ novelojn "realistajn" kiuj estas vere modelaj. Malpli gravajn rakontojn verkis *Martí Genís i Aguilar*, la aŭtorino *Dolors Monserdà de Macià* kaj *Josep Pin i Soler*, tradukinto de "Utopio" de la angla Moore. Majstraj priskribintoj de lokaj aŭ enlandaj tipoj kaj scenoj estis *Robert Robert* kaj *Emili Vilanova*, tiu lasta lasinta amason da pitoreskaj amuzaj verketoj.

Frederic Soler (uzinta la pseŭdonimon "Serafi Pitarra") kreis la modernan katalunan teatron, por kiu li verkis longan serion de dramoj kaj komedioj, en verso aŭ en prozo. Aliaj aŭtoroj verkis teatraĵojn, kiel ekzemple *Conrad Roure*, *Albert Llanas* kaj *Francesc Camprodon*. Sed la unua vere genia dramisto, posttremanta post si la popolamasojn per grandaj romantikaj verkoj, estis *Angel Guimerà*, alte inspirita poeto, aŭtoro de la plej krudaj dramoj en ĉiuspecaj medioj kaj de tragedioj ĉiuepokaj kie la altaj historiaj figuroj parolas per solenaj versoj vidigante siajn homajn pasiojn. Post Guimerà aperis *Santiago Rossinyol*, teatra aŭtoro kaj novelisto, kies verkoj estas plenaj samtempe de ironio kaj sentimentaleco; *Ignasi Iglesias*, poeto de la popolo, defendanto de la humiluloj, kies ĝojojn kaj malĝojojn li majstre pentris; *Joan Puig i Ferréter*, granda dramisto kaj granda novelisto, kuniganta la kvalitojn de teatra lerteco kaj psikologia observemo; *Adrià Gual*,

aŭtoro kaj direktoro de la "Escola Catalana d'Art Dramàtic", kiu direktis la prezentadon de "Edipo Reĝo" de Sofoklo kaj de "Ifigenio en Taŭrido" de Goethe, kaj kiu ĉiam okupis sin en la disvolvado de la bona kaj altkvalita teatro; *Josep Pous i Pagès*, alia dramisto kaj ankaŭ novelisto.

Tiu riĉeco de prozistoj kaj teatraj aŭtoroj ekflorintaj tuj post la unuaj poetoj de la renaskiĝo ne superis tamen la abundecon de bonaj poetoj. Kiam oni estis ankoraŭ admiranta la du epikajn poemojn de Verdager "Atlantido" kaj "Canigó", ekaperis unu post alia la poeziaj verkoj de *Apelles Mestres*, aŭtoro ankaŭ de muzikaj teatraĵoj, bonega desegnisto ilustrinta mem siajn verkojn, publikiginto de pli ol sesdek volumoj; *Magi Morera i Galicia*, publikiginto de multaj verkoj de Shakespeare; *Miquel Costa i Llobera*, klasika poeto, adoranto de la formo, ĉiam plene inspirita; *Joan Alcover*, kies poezio estas fluanta de muziko; kaj fine *Joan Maragall*, poeto de la amo, tradukinto de Goethe, espriminto de novaj estetikaj teorioj, kiu signas novan vojon al la kataluna poezio, same kiel antaŭe faris Verdager.

Kaj ankoraŭ pli da prozistoj aperis inter tiom da altaj poetoj. Ni citos nur kelkajn nomojn: *Pompeu Gener*, malkvieta spirito, kaj filozofio, verkinta katalune kaj france; *Joaquim Ruyra*, *Prudenci Bertrana* kaj *Victor Català*, tri gloraj nomoj, fortaj prozistoj, kiuj en siaj verkoj montras sian genion en unu sola paragrafo: *Joaquim Ruyra*, kreanto de majstraj tipoj; *Prudenci Bertrana*, lerta rakontanto; *Victor Català*, aŭtorino de la plej fama kataluna novelo "Solitud"; la eleganta verkistino *Carme Karr*; la fratoj *Folch i Torres*; *Enric de Fuentes*; *Carles de Fortuny*; *Jaume Massó Torrents*.

Ni diris ke *Joan Maragall*, same kiel Verdager, signis novan vojon al la kataluna poezio. Efektive li komencis uzi tre puran lingvon kaj en ĉio li estis tre delikata. Se la unuan gradon de perfekteco en la lingvo atingis la aŭtoroj post Verdager, la duan gradon en tia perfekteco certe atingis la aŭtoroj post Maragall.

El la poetoj iel ricevintaj la Maragall'an influon, estas rimarkindaj: *Emili Guanyabéns*, tradukinto de francaj aŭtoroj krom originala poeto; *Lluís Via*; *Josep Pijoan*; *Antoni Navarro*; *Joan Llongueras*; kaj pli ol ĉiuj *Joan Maria Guasch*, kantanto de la naturo en ĉiuj siaj poemoj, kies originaleco, freŝaj bildoj kaj muzika stilo estas nekonfuzebaj.

Post duon-jarcento da literatura florado, la lingvo estis jam plene renaskiĝinta, sed mankis ankoraŭ definitive fiksi ĝian ortografion kaj ĝian vortaron. En la unuaj jaroj de la nuna jarcento, la "Institut d'Estudis Catalans" entreprenis tiun taskon sub la gvidado de la eminenta filologo *pompeu Fabra*. Oni ne nur difinis ortografian sistemon pli etimologian ol fonetikan, pli similan al tiu de la ceteraj samdevenaj lingvoj, oni ne nur purigis la vort-

taron de fremdaj vortoj ne bone asimilitaj, sed ankaŭ oni restarigis sintaksajn formojn kaj aliajn riĉaĵojn el la mezepoka lingvo. Kun racia ortografio, kun bone fiksita gramatikaj leĝoj, kun plena unueco, baldaŭ la literaturo fariĝis centoble pli bela kaj brila.

Kaj kvazaŭ tiu perfektigita lingvo helpus la nunajn aŭtorojn al atingado de pli granda valoro, helpo kiun ne havis la antaŭaj aŭtoroj devigitaj mem trakti al si la vojon tra ĉiaj malhelpoj, la nunaj katalunaj verkistoj atingis tian forman perfektecon ke ili ne plu povas envii ion al la aŭtoroj en lingvoj plej kulturitaj. Bela pruvo pri tio estas la verkaro de la talenta poeto *Josep Carner*, kiun oni nomis princo de la poezio kaj kiun nun oni devas nomi ankaŭ princo de la prozo.

En tiu talenta uzado de la moderna kataluna lingvo, simile al Esperanto en forta grado simpligita kaj fiksita kaj tamen prezentanta mirigan elastecon kaj senfinajn eblecojn, rivalas multaj kaj kelkaj tre junaj verkistoj. Ni citas la nomojn de la ĉefaj el ili.

Josep Maria de Sagarra, poeto kaj dramisto; *Josep Maria López-Picó*, poeto; *Jaume Bojell i Matas*, poeto kaj plej eminenta oratoro; *Ventura Gassol*, poeto; *Carles Riba*, poeto, kritikisto, tradukinto de la "Odiseo" kaj aliaj klasikaj verkoj; *Clementina Arderiu*, poetino; *Llorenç Ribes*, poeto, tradukinto de "Eneido"; *E. M. Ferrando*, prozisto; *Carles Soldevila*, poeto kaj prozisto; *Maria Antònia Salvà*, poetino, tradukintino de "Mireia" de Mistral; *Joan Arús*, poeto kaj kritikisto; *Josep Lleonart*, poeto; *Tomás Garcés*, poeto kaj kritikisto; *Ambrosi Carrión*, teatra aŭtoro en verso; *Agustí Calvet (Gaziel)*, prozisto; *Eugeni d'Ors (Xenius)*, prozisto; *Alfons Maseras*, poeto kaj prozisto; *J. Roig i Raventós*, novelisto.

* * *

Jen estas finita nia ĝenerala trarigardo al la kataluna literaturo. Ĉio, kion ni diris, volis esti nur preparo al la legado de la prezentotaj tradukoj, kiuj certe pli taŭge informos la leganton pri la karaktero de la verkistoj. Sed ŝajnis konvene, ke antaŭ la legado de ĉiu unuopa aŭtoro, oni povu rigardi ilin kolektive. Nur tiel aperos klara ilia intima spirito, la spirito de tiu vasta movado, kiun ni pristudis en la literatura flanko, sed kiu havas flankojn artan, sciencan, muzikan, politikan, kiu disvolviĝis sub la devizo:

VINDICAMUS HEREDITATEM PATRUM NOSTRORUM

Ni ankaŭ, eĉ kiel esperantistoj, proklamas nian rajton konservi tiun nacian heredaĵon kaj ankoraŭ volas disvastigi ĝin tra la mondo per la internacia lingvo Esperanto. Ni volas honori la lingvon de niaj praavoj per la lingvo de niaj pranepoj.

LA «KATALUNA ANTOLOGIO»

Tiu-ĉi "Antologio" estas vere tia nur pri la aŭtoroj de la periodo moderna, kaj pli precize ankoraŭ, nur pri la aŭtoroj de la dua duono de tiu periodo florintaj de post Verdaguer, kiu naskiĝis en la jaro 1845.

Sed ni kredis ke estos oportune enmeti ankaŭ kelkajn pecojn de mezepokaj aŭtoroj, kiuj, por tiel diri, prezentas la nobelajn titolojn de la kataluna lingvo kaj klarigas kiele tiu lingvo povis elporti dum jarcentoj la pezon de malfavoraj cirkonstancoj, ne nur ne malaperante, sed eĉ renaskiĝante kun ankoraŭ pli granda vivo kaj forto.

Ni ne trograndigis la nombron de tiuj literaturaĵoj, ĉar ili ne estas plene adekvataj al la gusto de la ordinara moderna leganto. En ĉiuj lingvoj, la malnovaj aŭtoroj de la klasika literaturo postulas ian apartan studadon, ne nur rilate al la lingvo, kiu poste evoluis, sed ankaŭ rilate al la temoj, kiuj reflektas aliajn epokojn, aliajn sociajn vivkondiĉojn, aliajn influojn de la sin sekvintaj skoloj kaj grandaj historiaj movadoj. Tiu kontrasto de karaktero kaj gusto estas forta, pli ol en iu alia, ĉe la malnova literaturo kataluna, kiu posedas monumentojn verkitajn antaŭ la ekzisto de Dante, Cervantes kaj Rabelais.

Por reprezenti la periodon de la dekadenco, ni ne trovis ion pli decan ol la popolkantoj, kiuj mirinde konserviĝis en Katalunujo. Ili, pli bele ol la mezvaloraj pecoj de tiu aŭ alia aŭtoro izole florinta sen rekta kontakto kun forta literatura tradicio, povas respeguli la literaturan senton de la popolo, kiu gardis en sia animo, kiel en plejsanktejo, la trezoron de la lingvo, la kernon de nova diskreskiĝonta literaturo.

La periodo de la renaskiĝo komenciĝas en 1833, sed en ĝia unua parto la kataluna literaturo produktas ankoraŭ simplajn verkojn, kies temo estas patriota, pri tradicioj, pri folk-loro, pri re-

ligio, pri sentoj de amo al la virino kaj pri admiro al la naturo disvolvitaj ankoraŭ en iom primitiva maniero, kaj ĝenerale pri aferoj entute ne interesaj por internacia legantaro. Nur ĉe la poetoj Verdaguer kaj Guimerà aperas altfluganta inspiro kaj abunda kaj plenvalora verkaro. Per iliaj nomoj komenciĝos nia "Antologio": ĝin malfermos la verko de Verdaguer "Atlantido", kiu signas epokon kaj inde taŭgos al ni kiel deirpunkto.

* * *

El la verkoj de modernaj aŭtoroj ni prefere elektis "verson" kaj "mallongan prozon". En nia "Antologio" abundos la poemoj, ĉar en la kataluna literaturo atingis grandan disvolviĝon la versa formo, kiu proporcie estas pli riĉa ol la prozo. Pro la ĝenerala facileco de la katalunoj en la arto de la versfarado, oni diris ke ili estas la modernaj heredintoj de la trobadoroj.

El la prozistoj, ni elektis mallongajn prozaĵojn kaj rakontojn, en la neebleco traduki plenajn longajn romanojn. La procedo traduki "mallongigojn" aŭ apartajn ĉapitrojn ne plaĉis al ni. Nur kelkafoje ni faros tion. Vere ni perdos la okazon vidigi al la leganto interesan aspekton de la kataluna literaturo: longajn romanojn, precipe "ruralajn", kelkaj el kiuj estas kompareblaj al la ĉefverkoj de la rusaj kaj polaj aŭtoroj. Sed nia celo estas montri nur parton, ĝeneralan perspektivon de la kataluna literaturo.

Alia interesa flanko, kiun ni ne parte sed bedaŭrinde preskaŭ plene malatentos, estas la riĉeco de teatraj verkoj. Nian tutan "Antologion" plenigus nur kelkaj el la plej famaj dramoj de Guimerà, Rossinyol, Iglesias, Gual, Puig i Ferrer, k. a., kiuj estas multfoje luditaj katalune kaj hispane, kaj tradukitaj ankoraŭ en aliajn lingvojn. Tamen ni prezentos fragmentojn de tragedioj aŭ de muzikaj teatraĵoj en verso, ĉar la intereso de la versa traduko povas kompensi la "fragmentecan" mankon. Cetere, estas jam plene eldonitaj en Esperanto la dramoj "Mistero de doloro" de Adrià Gual, ludita unuafoje en esperanto okaze de la V^a Universala Kongreso en 1909, traduko de F. Pujulà; "La patrino" kaj aliaj, de Santiago Rossinyol, traduko de A. Sabadell; kaj estas en preparo la eldono de la fama "Terra Baixa" (*En la malsupra lando*) de Angel Guimerà.

* * *

La aŭtorojn entenatajn de tiu-ĉi "Antologio" ni ordigis laŭ la ordo de iliaj naskiĝdatoj, kiu proksimume estas la ordo de ilia apero en la literatura kampo. Ni ne ŝatis prezenti ilin kunigitaj laŭ alfabeto ordo, nek disigitaj laŭ karaktero de poetoj aŭ prozistoj, nek grupigitaj laŭ literaturaj skoloj.

Ni klopodis prezenti la aŭtorojn plej konatajn, sed kelkaj nomoj restis ankoraŭ ekster tiu-ĉi "Antologio". Ni ne pretendas ke

ĝi enkalkulas ĉiujn. Kelkajn ni ne povis prezenti, kun granda bedaŭro, pro la neebleco doni al nia verko plian amplekson; aliajn ni forlasis, pro tio ke ili estas malfacile tradukeblaj, ĉu pro la preskaŭ nur muzika valoro de iliaj poeziaj verkoj, ĉu pro la tro nacia aŭ loka medio de la priskribitaj agadoj; aliajn ni malatentis, pro tio ke ili estas nuraj imitantoj de la "poetoj de avangardo" francaj aŭ italaj; aliajn ni eble simple forgesis.

Sed tamen ni povas diri ke en nia "Antologio" troviĝas preskaŭ ĉiuj modernaj katalunaj aŭtoroj pristudataj en la ceteraj antologioj aŭ kritikaj studoj en lingvoj hispana, franca, itala kaj germana.

* * *

Multaj el la prezentataj tradukoj estas premiitaj de la "Internaciaj Floraj Ludoj" kaj jam aperintaj sur la paĝoj de "Kataluna Esperantisto" aŭ en aliaj gazetoj, sed la plej granda parto estas neeldonita.

En la tradukado ni klopodis atingi la plej grandan fidelecon. Estas du procedoj traduki, kiujn ni povus nomi "nacia" kaj "internacia". La unua atentis precipe al la konservado de la originalaj trajtoj, ne nur zorgante pri la fideleco al ĉiuj nuancoj de la teksto, sed eĉ pri la ordo de la vortoj en la frazkonstruoj kaj pri aliaj apartaĵoj ne koncernantaj la fundon de la enhavo. La dua procedo, plenumante la nepran kondiĉon de fideleco, agas pli libere en la sintakso kaj pli celas prezenti klaran kaj facilan legadon ol laŭvortecon konfuzan kaj pezan. Generale ni uzis pli la duan procedon ol la unuan, kiun ni rezervis por la traduko de nur kelkaj prozaĵoj de fortaj stilistoj. Sed, uzante unu procedon aŭ la alian, ĉiam ni klopodis esti plene fidelaj kaj eĉ respreguli laŭeble la propran stilon de la verkinto.

Ni forte evitis neologismojn, novajn afiksojn kaj ĝenerale ĉiajn novaĵojn proponatajn de reformemuloj. Ni sincere kredas, ke la Fundamenta Esperanto jam posedas tian kolosan riĉecon, ke al talenta uzanto de la lingvo estas nenecese ĉerpi el aliaj fontoj. Tiuj, kiuj trovas grandajn mankojn en nia lingvo, plej ofte montras nur proprajn mankojn: manko de studo, manko de praktiko, manko de talento. Ni diras nian opinion kun kruda sincereco, eĉ riskante ke oni nomu nin pedantaj.

* * *

En la versaj tradukoj, ni konservis preskaŭ ĉiam la rimon kaj la ritmon de la katalunaj tekstoj. Oni atentis ke, en la kataluna poezio, ekzistas la ritmo *rigora* kaj la ritmo *libera*.

La ritmo *rigora*, laŭ verspiedo, estas konstante egala en ĉiuj linioj. La ritmo *libera* estas principe la sama, sed kun kelkaj liberecoj. Ni ne entreprenos tie-ĉi studon pri tiu afero: ni nur espri-

mos la opinion ke en Esperanto devas esti akceptata, apud la *rigora* ritmo ŝatata precipe de la germanlingvaj esperantistoj, ankaŭ la ritmo *libera* ekzistanta en ĉiuj lingvoj latinidaj.

Fakte la libera ritmo en Esperanto estas jam akceptita, ĉar en ĝi estas verkitaj multnombraj poemoj; ĝi estas persone aprobita de la prezidanto de la Esperanta Akademio, S-ro Th. Cart, kaj ĝenerale akceptita de la esperantistaro.

* * *

La tradukoj de tiu-ĉi "Antologio" estas faritaj de diversaj katalunaj esperantistoj en diversaj epokoj. Generale ni devis fari malmultajn korektojn. Kelkajn ni kuraĝis fari, ne pro efektiva eraro de la tradukinto, sed nur por atingi ian stilan unuecon tra la tuta "Kataluna Antologio". Ekzemple, ni ŝanĝis "je" per "de" en la esprimo "plena je" ofte trovebla en tradukoj verkitaj antaŭ jaroj, sed nun preskaŭ malaperinta.

Aliajn similajn korektojn ni sisteme faris, ĉiam respektante tamen la escon de la formoj preferitaj de la tradukintoj. Eĉ kelkfoje ni lasis netuŝitaj esprimojn ne plaĉajn al ni persone.

Entute, ni kredas, la stilo de la "Antologio" estos klara kaj bela: almenaŭ ĉiuj ĝiaj kunlaborantoj klopodis fari siajn verkojn kun la plej kora amo al la lingvo kaj la plej granda respekto al la "Fundamento de Esperanto" de nia kara majstro L. L. Zamenhof.

* * *

Kaj nun, kara leganto, pardonu ke ni tiel longe restis, kvazaŭ hundo kuŝanta ĉe la pordo, malhelpante al vi la tujan eniron en la domon. Ni volus ke, enirinte en ĝin, vi trovu ĝin komforta kaj bela, kaj malfermata al ĉiu fremda mano... *Pro nia domo* ni laboris, preparante la "Katalunan Antologion", kiu celas diskonigi la trezoron de nia patra lingvo. En nia spirito fajre brilis du nomoj, dum la longa kaj malfacila preparo de nia verko: *Esperanto* kaj *Catalunya*... Al la du nomoj, al la du idealoj, ni ĉiam donis nian koran fervoron: nur pro tiu *entuziasmo* ni kuraĝis entrepreni la kolosan laboron de nia "Antologio", al kiu ni dediĉis kelkajn jarojn, la plej bonajn jarojn de nia... de mia alie sencela juneco.

Jaume GRAU CASAS, L. K.

Barcelona, Decembro 1925.

P. S.—Mi devas esprimi koran dankon al S-ro Gustau Galceran, el Vilanova i Geltrú, kies modesteco estas tiom granda kiom lia talento, pro lia helpo en la traduko de nomoj de animaloj kaj plantoj kaj de aliaj radikoj malfacile tradukeblaj; al la kataluna

aŭtoroj alprenitaj; al la bibliotekistino Montserrat, pro ŝia helpo en la korektado de presiloj dum la preparo de la "Antologio", kiom pro lia ĉiutempa kaj lia gvidado en lingvaj aferoj de post la unuaj tagoj de mia esperantigo. — J. G. C.

BIBLIOGRAFIO

Antologioj de katalunaj aŭtoroj

- Jean Amadeu*: Anthologie Catalane: les poètes roussillonnais. "Bibliothèque Catalane", Perpignan, 1908.
Josep Masferrer: Les cent millors poesies líriques de la lengua catalana. "Els Nostres Clàssics", Barcelona, 1925.
Johannes Wastenrath: Catalanische Troubadoure der Gegenwart. Leipzig, 1890.
Rudolf Grunberg: Katalanische Lyrik der Gegenwart. Hamburg, 1930.
"L'Avenc": Biblioteca Popular de: Antologia de poetes catalans d'avui. n-ro 135 de la kolekto, Barcelona, 1913.
Ernest Moragas: Les cent millors poesies catalanes. Barcelona, 1911.
Alexandre Galadí: Antologia de Poetes Catalans Moderns. "Societat Catalana d'Edicions", Barcelona, 1914.
A. Schneebelen: Anthologie des poètes catalans contemporains depuis 1854. Kolekto "Les grandes anthologies", J. Povolozky & Cie., Paris, 1922.

Studoj pri la kataluna lingvo

- Pompeu Fabra*: Gramática de la Lengua Catalana. (Prologo.) Barcelona, 1912.
Antoni Griera: Els factors històrics de l'extensió del català. "Quaderns d'Estudi", n-ro 46.
Institut de la Llengua Catalana: Diccionari Ortogràfic. (Prologo.) Barcelona, 1917.
Emile Legouis: Langue française et langue catalane. "Revue Catalanique", Perpignan, 1907.
Mancomunitat de Catalunya: Petskribo al la Prezidanto de la Hispana Registaro, pri la rajtoj de la kataluna lingvo. "Quaderns d'Estudi", Majo 1916.
Ernest Molins: La lengua catalana. (Vol. I de "Geografía General de Catalunya".)

Studoj pri la kataluna literaturo

- Jean Amadeu*: La poésie populaire catalane. "Revue Catalane", Perpignan, 1911.
Joaquín Arús: Evolución de la poesía catalana. Barcelona, 1922.
Victor Balaguer: Historia de los trovadores (6 vol.). Madrid, 1878.
A. Bulbena i Tosell: Crestomatia catalana. Barcelona, 1907.
F. R. Cambouliu: Els trobadors catalans. Barcelona, 1910.
F. R. Cambouliu: Assaig històric sobre la Literatura Catalana antiga, Barcelona, 1910.
Carles Capdevila: Les grans figures del renaixement de Catalunya. Serio de artikoloj en "Revista de Catalunya".
Mario Casella: Agli albori del Romanticismo e del moderno Rinascimento Catalano. "Rivista delle Biblioteche e degli Archivi", jaro XXIX, 1918, p. 81-120.
Josep Comerma: Història de la Literatura Catalana. "Editorial Políglota", Barcelona, 1923.
F. Curet: El arte dramático en el resurgir de Cataluña. "Editorial Minerva", Barcelona, 1918.
J. Farran i Mayoral: Lletres a una amiga estrangera. Barcelona, 1920.
Joaquim Folguera: Les noves valors de la poesia catalana. Barcelona, 1919.
Tomàs Garcés: La poesia catalana moderna. "Anuari dels Catalans", Barcelona, 1923.
Tomàs Garcés: "Les Lletres", konstanta rubriko en "Revista de Catalunya".
F. Gras: Siluetes d'escriptors catalans del segle XIX. "L'Avenc", Barcelona, 1909.
Kolsen: Dichtungen der Trobadors. Halle, 1919.
"Lectura Popular" (Biblioteca d'Autors Catalans): kolekto de pli ol 300 kajeroj kun bio-bibliografiaj notoj. "Il·lustració Catalana", Barcelona.
Alfons Maseras: La poesia postmaragalliana. 2 artikoloj en "Quaderns d'Estudi", Aprilo kaj Majo 1918.
Jaume Massó Torrents: L'antiga Escola poètica de Barcelona. Barcelona, 1922.
Jaume Massó Torrents: La cançó provençal en la literatura catalana. "Miscel·lània Prat de la Riba", vol. I, p. 341 ĝis 460. Institut d'Estudis Catalans, Barcelona, 1923.
Jaume Massó Torrents: Bibliografía dels antics poetes catalans. "Memòries i documents de la Secció Històrico-Arqueològica de l'I. d'E. C.", jaroj 1913-14.
M. Milà i Fontanals: De los trovadores en España. Barcelona, 1861.
Manuel de Montoliu: Estudis de literatura catalana. Barcelona, 1912.

- Manuel de Montoliu*: Manual d'història crítica de la literatura catalana moderna. "Associació Protectora de l'Ensenyança Catalana", Barcelona, 1922.
- Lluís Nicolau d'Oliver*: Perspectiva general de la literatura catalana. "La Revista", Barcelona, 1917.
- Lluís Nicolau d'Oliver*: La literatura catalana antiga. "Anuari dels Catalans", Barcelona, 1923.
- Lluís Nicolau d'Oliver*: Introducció al estudio de la literatura catalana. "Estudio", Junio 1915, p. 377-407.
- Lluís Nicolau d'Oliver*: Del Diàleg en la poesia catalana medieval. Eldono de l'"Escola Catalana d'Art Dramàtic".
- Giovanni Palomba*: Attraverso la letteratura catalana. Sassari, 1909.
- J. Péprax*: La Renaissance des lettres catalanes. Perpignan, 1883.
- Alexandre Plana*: Les tendències actuals de la poesia catalana (prologo al "Antologio", 1914).
- P. Puiggari*: Notice sur les troubadours catalans et sur un ancien chansonnier de l'Académie du Gay Saber de Barcelone, 1830.
- Carles Riba*: Escolis i altres articles. Barcelona, 1921.
- A. Rubió i Lluch*: Documents per a l'Història de la cultura medieval catalana. I. d'E. C., 1908.
- Pierre Vidal*: Notions d'Histoire de la Littérature Catalane. "Revue Catalane", Perpignan, 1908.

ANTIKVAJ AŬTOROJ